

Atentu esperantistoj ! Ĉi tie parolas la Svisa Kurtonda Radiostacio. Vi aŭdas prelegon de Claude Gacond, prezidanto de Esperanto-Edukistaro de Svislando, kiu parolas pri la monda federalismo.

La mondaj federalistoj el Svislando renkontiĝis la 17-an de februaro en Lausanne. Tiu kunveno permesis ekzameni plej detale la hodiaŭan mondan situacion. Montriĝis plian fojon, ke la starigo de monda registaro estas la sola solvo al la ĉiam kreskanta manko de sekureco reganta inter la nacioj. En kelkaj minutoj mi ne povas resumi debatojn de tiu kunveno. Mi provos tamen diri al vi kelkajn vortojn pri la nuna stato de la monda federalismo.

Advokato Max Habicht, el Ĝenevo, kiu estis juristo ĉe Ligo de Nacioj kaj hodiaŭ ankoraŭ ĉiam okupiĝas pri internacia juro, klarigis, kial Unuiĝintaj Nacioj kiel Ligo de Nacioj riskas morti pro sia nekapablo evolui : ne ekzistas en la Ĉarto de Unuiĝintaj Nacioj, ekster la paragrafo 109, mekanismo, kiu permesas revizion aŭ fundamentan ŝanĝon. Tiu paragrafo 109 antaŭvidis por la jaro 1955 la starigon de komisiono por amendoj al la Ĉarto. Sed ĉar tiujn amendojn devus akcepti ĉiuj ŝtatoj unuanime, kaj ĉar tio ne povus okazi, tiun komisionon oni neniam elektis. Tamen ŝanĝoj de la bazoj de Unuiĝintaj Nacioj fariĝas necesaj.

Unuiĝintaj Nacioj surpapere aboliciis militon. Sed ili lasis al siaj membroj ĉiujn eblojn militi. Ekzistas ja Sekuriga Konsilio, sed ĝi povas labori nur kiam konflikto ne intime tuŝas la politikon de la veto-raĵantaj ŝtatoj. Ĝi do povis interveni en la Kongo-aferon, sed ĝi devis silenti koncerne Berlinon, Alĝerion aŭ Kubon.

Ni, la simplaj civitanoj kaj la ŝtatestroj, bone sentas, ke tiu situacio ne povos eterne daŭri sen konduki al tria mondkonflikto, ĉar ĝi malebligas la solviĝon de la hodiaŭaj problemoj, kaj do malpermesas krei la atmosferon, kiu permesus konstrui pli homecan mondon.

Dum la tekniko antaŭeniras terure rapide, la homaro ne kapablas ŝanĝi sian pensmanieron. Ni pensu pri la progreso de la aviado. 1903 : la fratoj Wright, en Usono, konstruas la unuan veturilon, kiun oni povas nomi aviadilo. 1908 : Henri Farman flugas la unuan kilometron en Issy-les-Moulineaux (Francio), 1909 : Louis Blériot transflugas Manikan Maron. 1927 : Lindbergh transflugas Atlantikon en 36 horoj. Niaj infanoj hodiaŭ, kiam ili konstatas, ke raketoj ĉirkaŭiras Lunon aŭ Venuson, vivas en alia teknika epoko, ol iliaj geavoj. Sed Thomas Wilson, kiu ĉe la fondo de Ligo de Nacioj en 1920, provis instigi siajn ambasadorajn kolegojn fondi veran Mondan Registaron, Edmond Privat, kiu en 1931 eldonis la verkon *Le Choc des patriotismes* esperantigita en 1935 sub la titolo *Interpopola Konduto*, Max Habicht, kiu en 1939 avertis Ligon de Nacioj en demisia letero pri ĝia danĝera eraro, tiuj tri homaranoj restas por niaj infanoj revoluciuloj. Ili profetis, ke tiom longe, kiam ne ekzistos monda registaro kun monda polico kaj monda tribunalo, kiuj kontrolos la farojn de la nacioj kaj de ties registaroj, tiam la popoloj kuros de katastrofoj al katastrofoj ĉiam pli teruraj. Ili ne nur pensis al militoj, sed ankaŭ antaŭvidis la multobligon de la homoj sur la Tero : ni estos 7 miliardoj da homoj en la komenco de la 21-a jarcento, kaj multajn aliajn aferojn hodiaŭ okazantajn : sendependiĝo de ĉiuj popoloj, malsato, ktp...

En 1947 fondiĝis en Vevey, urbeto apud Lausanne (Svislando), la Monda Asocio de Mondfederalistoj en la celo kunordigi la laboron de ĉiuj movadoj, kiuj celis starigon de monda registaro. Tiu asocio vivas. Hodiaŭ ĝi havas pli ol 100'000 membrojn en 40 landoj. Ĝia sekretario troviĝas en Hago (Nederlando). Lastjare, la 24-25-ajn de novembro, 200 japanaj mondfederalistoj kunsidis en Kameoka por organizi la 11-an Mondan Kongreson de tiu Monda Asocio de la Mondfederalistoj, kiu okazos en aŭgusto en Tokio.

Dum tiuj kelkaj jaroj la mondfederalistoj amasigis dokumentojn, jurajn studojn, proponojn, fundamentajn verkojn, kiujn la internaciaj juristoj ne plu povas nekoni sen montriĝi ignorantoj. Dum venontaj prelegoj ni ekzamenos kelkajn el tiuj laboroj.

Claude Gacond, 16-a radioprelego, 1963.03.20

Vi aŭdis prelegon en esperanto el Svislando. Parolis Claude Gacond pri monda federalismo.

Ĝis reaŭdo !

-oOo-